

LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 166, 2020: 6



Sopiro pri la matenaj bildoj

2021 está chegando!



Aproveite
para renovar
sua filiação à EASP.

Esperamos poder
contar com sua
adesão também
em 2021.

Acesse o site da EASP ou vá direto à página abaixo

easp.org.br/asocio/kotizoj_2021.html

LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 166, 2020: 6

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj



La kovrilo estas la foto de Genildo † en la 3-a E-Kongreso de EASP (Lorena) 2008

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.
Subtena membro.....R\$ 300,00.
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario: José Roberto Tenório

2-a Sekretario: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasisto: Maria Delza Macabu

Direktoro pri propagando: Genildo Martins
Coelho †

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

ENHAVO

7

Sopiro pri la
matenaj bildoj

17

Intervjuo:
Jolanta van Holstein

23

Esenca verkado

11

Moderna brazila
literaturo

20

Ni lernu de la birdoj
kaj la lilioj

26

Lingvaj Respondoj

29

Kisu la Grondon

13

Siliko-grafio: la arto
per koloraj sabloj

22

Pli granda tago

30

Recenzo:
"Ses rolantoj
serĉantaj aŭtoron"



La urbo Mogi das Cruzes

Vortoj de la prezidanto

Karaj geamikoj:

Mi dankas ĉiujn, kiuj ĉeestis kun ni dum ĉi tiu jaro.

Ni trapasis tre malfacilan tempon, en nia lando kaj en la tuta mondo. Ni bezonas kune plu stari, neniam forgesi unu la alian, eĉ se nur per komputilo.

Gravas, ke interkomunikado preventas nian sanon.

Mi invitas vin plu resti en virtuala babilado, en nia kafejo, ĉiusabate, je la 17-a horo. Bonvolu inviti ankaŭ viajn geamikojn.

Ni bezonas vin, junulo, kun viaj ideoj, kun via energio, kun via forto kaj revoluciemo. Por diskonigi Esperanton. EASP bezonas vin, ni estas malfortaj sen vi. Venu al ni en EASP, kaj tia kunlaborado plu daŭru post ĉi tiu malfacila momento.

Ni kalkulas je vi por ĉi tiu projekto.”



La urbo Lorena

Vortoj de la redaktanto

Jen ni proponas nian lastan Lampiron en 2020. Ĉi tiu estis jaro tute stranga, ankaŭ por nia revuo. Espereble, la socia izoligo faciligis pli da legado, ankaŭ de nia revuo. Nia intenco ĉiam estas, ke La Lampiro aperu kiel kultura publikaĵo, nome kanalo, per kiu EASP-anoj kaj neEASP-anoj povu montri siajn pensojn pri nia movado, pri la mondo, pri la vivo, ĝenerale. Ni sekvas ankoraŭ la tradician vojon eviti politikajn kaj religiajn polemikaĵojn, en spirito de respekto kaj toleremo pri ĉies kredo kaj pensmaniero. Kaj super ĉio, nia intenco estas flegi kaj bredi nian karan lingvon kaj ĝian humanisman Internan Ideon, pere de klerigaj artikoloj kaj edukaj klopodoj.

Por tio, ni kalkulas je via verkemo, ni fakte bezonas vian verkemon. Fine de la jaro, ni petas de vi ion tute elkoran: verku por Lampiro, en 2021! Mi scias, ke vi havas bonajn ideojn, sekve ne hezitu sendi ilin al ni. Ni anticipe dankas.

Kaj havu Feliĉan Novjaron 2021-an, sen virusoj, sed kun varmaj manpremoj kaj brakumoj!

PAULO SÉRGIO VIANA

Sopiro pri la matenaj bildoj

JOSÉ ROBERTO TENÓRIO

Sub ia premo de amikoj kaj familianoj, pasintjare mi instalis la programon Whatsapp kaj komencis uzi ĝin iom suspekteme. Ĝi montriĝis ja utila helpilo por solvi diversajn ĉiutagaĵojn. Sed en ĉiu florbedo estas ankaŭ dornoj kaj baldaŭ ekaperis la konataj "bondeziraj bildoj". Komence ili aperis ŝpareme, sed post kelke da tempo, ĉar ili pli oftigis, mi decidis ne plu reagi kaj efektive dum kelkaj monatoj ili ĉesis aperi.

Subite la bildoj reaperis sur la ekrano de la komputileto. Tio estis Genildo. Ĉiutage matene li sendis unu tian bildon. Mi iom surpriziĝis, ĉar mi sciis ke mia amiko estas tre okupita homo. Kiel li trovas tempon por sendi tiajn aferojn? - mi pensis. Komence mi emis uzi la iaman strategion, nome ne reagi. Sed, ĉar nun temis pri unu sola sendanto, eble tio estus bona okazo por superi la rezistemon al tiaj sendaĵoj. Fojfoje mi reagis per iu "La samon ankaŭ al vi", tamen sen bildo. Post kelkaj bildo-ricevoj kaj iuj reagoj, malgraŭ mia strebo, mi daŭre vidis nenian sencon en tia speco de "socia interago".

Dum kelkaj tagoj mi multe cerbumis pri kiel aliigi tiajn sendaĵojn al io praktika. Fine, ideo sparkis en la kapo: mi proponus al mia amiko tradukon de la eldiraĵoj kun posta

komentado pri la solvoj.

Bedaŭre ne estis tempo proponi la defion al mia amiko. Li subite malbonfartis, enhospitaliĝis kaj ne plu revenis hejmen.

La unua defio, kiun mi proponus al mia amiko por traduko, estus tiu (suba) eldiraĵo sendita de li freŝdate.



Mi scivolis kiel li elturniĝus por esperantigi ĝin. Se iu leganto pretos akcepti la defion traduki la menciitan eldiron, tio estos bela omaĝo al mia amiko.

Nun io mankas surekrane: la ĉiutaga bildo de mia amiko.

Prof. Genildo Martins Coelho, aŭ simple Genildo por la geamikoj, estis komunikema kaj humurema homo, interesata pri diversaj enlandaj kaj alilandaj temoj, kio igis lian konver-



Kiel gasto de la Kultura Kunveno (2010)

sacion agrabla.

Fervora esperantisto, li ŝatis rakonti jenan okazintaĵon pri sia esperantistigo: kiam li venis al la unua leciono de Esperanto, la klasĉambro estis plena. Revene al la dua leciono, la sekvan semajnon, la kursgvidanto trovis nur unu lernanton - lin mem. Ĉar la instruanto ne emis gvidi lecionon por unu persono, de tiam li strebis lerni la lingvon sola.

Liaj fruaj movadaj engaĝigoj okazis ĉe Esperanta Klubo Zamenhof, en la 1980-aj jaroj, kie li partoprenis en diversaj estraraj postenoj, inkluzive kiel prezidanto dum du oficperiodoj.

Poste li proksimiĝis al la agadoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) kaj fariĝis ĝia prezidanto en du okazoj: unue inter la jaroj 2004 - 2009 kaj poste inter la jaroj 2016 - 2019. Li redaktis la organon de EASP, *La Lampiro*, dum ses jaroj kaj fariĝis konstanta vizitanto de la libroservo de la asocio, kies novaĵojn li ĉiam akiris por riĉigi sian hejman bibliotekon.

Danke al sia prestiĝo kiel universitata profesoro kaj entreprenisto, li sukcesis lokon por gastigi tri gravajn Esperanto-eventojn en la ĉefurbo San-Paŭlo: la 29-an Brazilan Kongreson de Esperanto (BKE), kiu

okazis en la Instituto Mackenzie, en 1993, kun la partopreno de pli ol 700 personoj; la 8-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto (TAKE), kune kun la 46-a BKE, okazintaj en la Fakultato Santa Marcelina, kun la partopreno de pli ol 400 personoj; kaj la jubilean Kongreson de EASP, okazintan en la festsalono de Asocio de Oficiroj de Militista Polico de San-Paŭlo, en 2017, celebre al ĝia 80-jariĝo.

Emerita profesoro pri Fiziko kaj entreprenisto en la fakoj pri Nuklea Medicino, Radioterapio kaj Radiodiagnozo, li forpasis la 10-an

de novembro 2020, en la aĝo de 74 jaroj, lasante vidvinon, du filinojn kaj nepinon.

Al la kunlaborema samideano, kiu adiaŭas nin en tiuj tagoj de necertecoj, nian dankemon kaj eternan amikecon.

Al la familianoj kaj amikoj niajn kondolencojn.

(Prof. Genildo M. Coelho: 1946-2020)



Genildo (maldekstre) en la fondatrevono de Libereco Esperanto-Grupo (2009)



En la 11-a Tut-America Kongreso (2011)



En la sidejo de EASP okaze de la Zamenhofa Festo (2007)

Moderna brazila literaturo

Filozofoj

(Millor Fernandes †) Tradukis per James Rezende Piton

eltiraĵo el la libro “Lições de um ignorante” (Lecionoj de nesciulo), José Álvaro Editor S.A., 1963, p. 21-22.:

Filozofoj alvenis por konferenco pri filozofio kaj enhoteliĝis. Ili kunvenis en la apartamento de la plej maljuna filozofo kiam sonoris la telefono.

— Tio estas por unu el ni aŭ ĝi estas misvoko — diris tiu el la Skolo de Komuna Saĝo.

— Eble vokas belega virino, kiu scias, ke mi alvenis kaj ŝi volas ekkoni min — diris la Idealisto.

— Eble vokas junulino al kiu mi faras donacojn kiam mi venas tie ĉi — diris tiu el la Cinikisma Skolo.

— Ĝi estas por mi — asertis la Hedonisto.

— Kaptu la okazon kaj mendu kafon — diris la Utilisto.

Lasu ĝin sonori kaj ne respondu. Necesas, ke ni rezistu al la telefono — parolis la Stoikisto.

Ni kontrolu pri kiu temas — diris la Empiriisto.

— Probable temas pri tedulo — diris la Pesimisto.

— Iu ciferumis, la telefono vokas — diris la Fenomenologo.

— Ni ne respondu: ni nur spektu tiun fenomenon de la moderna vivo — diris la Platonisto.

— La voko povas esti por ni sed ĝi povas esti misvoko. Se ĝi estas por ni, ĝi povas esti por la bono aŭ povas esti por la malbono... — diris la Dualisto.

— Ĝi povas esti por kiu ajn inter ni kaj komuniki la plej neatendatan informon — diris la Eklektikisto.

Ne respondu. Oni komencos tedi nin — diris la Egoisto.

— Ni ne povas ne respondi ĉar la telefonistino jam diris, ke ni estastie ĉi kaj oni insistos — diris la Racionalisto.

— Ni nepre respondu, aliokaze kion oni diros pri ni? — diris la Pragmatisto.

— Kial respondi? Tio ŝanĝos nenion. Kial ne respondi? Tio ŝanĝos nenion — diris la Skeptikisto.

— Tiu sonoro vekas ĉe ni plej diversajn sentojn: ĉiu vibras laŭ siaj biologiaj, sociaj, klerigaj kaj moralaj koordinatoj. Ni respondu, ĉar ne temas nur pri telefonvoko; ĝi estas kolektiva reago de homoj ege spertaj pri la traktado de la penso — diris la Transcendisto.

— Mi respondos — diris la Realisto.

Siliko-grafio: la arto per koloraj sabloj

ANTONIA SOBRAL



Brazilo estas tre riĉa je popularaj artaj esprimoj. Por ĉi tiu artikolo, mi elektis unu apartan, originalan de la nordorienta regiono, ĉefe de la Ŝtatoj Cearao kaj Norda Rio-Grando.

Temas pri artaĵo farita el diverskoloraj sabloj, komponita tavolo ene de vitroj. Multaj estas la nomenklaturetoj donitaj al tiu arto, ekzemple Sablo-, Siliko-, Ceriko-, Ciklo-bildo, -gravuro, -grafio, -pejzaĝo, -desegnaĵo, ktp. Mi elektis la nomon Siliko-grafio, ĉar

ĝi plej similas al la vera. Tamen, mi opinias, ke Sablo-bildo estas la plej taŭga por klarigi la arton. La tekniko konsistas el la metado de pluraj tavoloj de malsamkoloraj sabloj enen de vitroj. Tiu vitroj devas esti travideblaj kaj senkoloraj, por ke la koloroj de la sabloj estu vidataj kun fideleco. Malgraŭ ke oni nomas tiun arton "koloraj sablaj boteloj", aliaj ujoj ankaŭ estas uzataj en ĝia farado, nome: kalikoj, taso, bovloj, boteloj kaj diversaj aliaj tipoj kaj formoj de ujoj.

Kun la helpo de longa stangeto aŭ akra kupra drato, la metiisto glitigas la deziratan sablo-tonon inter la aliaj. La desegnado estas farita interne kaj la rezulto estas observata de ekstere, sub la atentaj okuloj de la metiisto, por kontroli ĉu ĉio estas laŭplane. Li



infiltras unu sablon en la alian kaj kondukas ĝin al la dezirata loko. La tekniko postulas multan paciencon kaj koncentriĝon. Preskaŭ ĉiuj koloroj estas trovitaj en la sabloj kaj argiloj de la loka naturo, escepte de la verda kaj la blua, kiuj estas produktitaj el blanka sablo kun aldono de tinkturoj.

Kiel ĉiuj spontaneaj kreaĵoj, la historiaj dokumentoj pri tiuj brazilaj artefaritaĵoj montras malsamajn originojn. Unu versio atribuas al la infanoj Belisa kaj ŝia fratino Joana de Jesus la aranĝon de la unuaj boteloj da sablo. En 1918, iliaj gepa-troj konstruis domon sur Mon-teto Tibau, inter la du nordorien-taj ŝtatoj Cearao kaj Norda Rio-Grando kaj tie ekloĝis kun siaj infanoj. La du fratinoj ĝuis ludi sur la monteto, kie ekzistas granda vario de sabloj kaj argiloj diverskoloraj. Lutage el la jaro 1921 ili decidis pleniĝi travideblan botelon el vitro per tiuj sabloj, koloro post koloro en tavoloj, kaj jen estigis botelon plenan je koloraj strioj. Pro tio, la nomo Ciklo.



Alia versio, kaj la plej konata, atribuas al Joana Carneiro, loĝantino de la urbo Majorlandia, ankaŭ de la ŝtato Cearao, la ko-mendon de tiu artaĵo. En la 1950-aj jaroj tiu virino ekloĝis en tiu urbo kaj tie trovis belajn di-verkolorajn sablojn el delika-taj eroj, kiujn ŝi rikoltis el la su-pro de la klifoj de la regiono. Por

pasigi la tempon.

Ŝi ekplenis travideblajn vitrajn botelojn per tavoloj de koloraj sabloj, kiujn ŝi aranĝis en cirklaĵoj formoj de du centimetroj por ĉiu sabla tavolo. Iam, farante tion, antaŭ ol fini la pleniĝadon, la botelo falis. Ĉar la ujo ankoraŭ ne estis tute pleniĝita, la sabloj sin ĵetis flanken kaj miksiĝis. Hazarde, desegnaĵo formiĝis, kiu, laŭ la opinio de ĉeestanta filo, aspektis kiel pejzaĝo.



Buntaj sablaj klifoj

Unue la figuroj estis simplaj, nur geometriaj variaĵoj de surmetitaj koloraj sabloj.

Antonio Carneiro, ŝia filo, ĝojis pri tio, kion li vidis. Poste li eklernis la arton kaj ĝin perfektigis. Li respon-



decas pri la kreado de la unuaj pejzaĝoj per koloraj sabloj en boteloj

kaj ankoraŭ estas konata pro sia kapablo desegni per sablo. En la sekvaj jaroj disvastiĝis la bela arto de Majorlândia. Multaj turistoj volis aĉeti botelojn kun pejzaĝoj por porti kiel memoraĵojn. Pro tio Joana kaj ŝia filo ekinstruis al homoj en sia komunumo, inkluzive junulojn kaj infanojn. Estas interese rimarki, ke, kvankam ĉio komenciĝis per virina ago, la metio estis kaj ankoraŭ estas farita plejparte de viroj. De tiam tiu laboro estas la vivrimedo por multaj homoj de la regiono kaj multaj el ili estas nacie agnoskitaj kaj partoprenas landajn kaj internaciajn foirojn kaj ekspoziciojn.

Ĉi tiu speco de arto probable troviĝas en diversaj aliaj mondopartoj. en Mezoriento, precipe en la urbo Petra, Jordanio, la arto estas tre antikva kaj tipa en la regiono. Tie ĝi ricevas la nomon Siliko-bildo aŭ Siliko-gravuro, pro la skulptaĵoj en la rokoj.



De Andrew Clemens

En Usono, inter 1860 kaj 1890, Andrew Clemens el la urbo Dubuque, Iovao, famiĝis pro sia arto krei bildojn per plurkoloraj sabloj

kunpremitaj en vitrajn botelojn aŭ kruĉojn. La sabloj estis kolektitaj el la klifoj proksime al la rivero Misisipo.



El Petra

Estas interese rimarki, ke en tiel malsamaj lokoj la sama ideo fari arton per kolora sablo en vitraj ujoj kaj uzante tiajn similajn teknikojn, eble havas neniun rilaton aŭ influon inter si. La sola diferenco inter ili rilatas al la temoj. Ekzemple en Petra, de-zertoj, kameloj, dromedaroj kaj aridaj montoj estas reprezentataj. Tiuj de Andrej temas pri senti-mentaj poemoj, velŝi-poj, plantoj, bestoj kaj portretoj. La brazilaj temoj prezentas ĉefe, sed ne nur, strandojn, akvofalojn, domojn kaj velboatojn. En ĉiuj lokoj tiu arto naskiĝis spontanee, tie, kie naturo rivelas sin magia, inspira kaj aparte bela.



Zamenhof-Tago 2020



SABATO
12 DEC
14-a horo

easp

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

[youtube.com/user/Vivagazeto](https://www.youtube.com/user/Vivagazeto)

Intervjuo

Jolanta van Holstein

Sekretario de Internacia Esperanto-Instituto



Internacia Esperanto-Instituto estis fondita en Nederlando en la jaro 1930 kun la ĉefa celo: instruado de Esperanto. En tiu tempo Andreo Cseh, katolika pastro el Transilvanio, kaj Julia, nederlanda esperantistino, kunlabore organizis sennombrajn kursojn, seminariojn, prelegvesperojn, vojaĝojn por instrui kaj disvastigi Esperanton. Ĉar Andreo ne parolis la nederlandan lingvon, li kreis propran rektan metodon de instruado de Esperanto, kiun oni nomis Ĉe-metodo.

La tiama agado de pioniroj de

Esperanto kaŭzis, ke la intereso por la kursoj de Esperanto estis grandega kaj por organizi ilin necesis administra aparato kaj oficejo. Tiamaniere naskiĝis la ideo pri la Instituto, kiu okupos sin pri Ĉe-instruado (ĉefe organizo de la Ĉe-kursoj kaj la eduko de Ĉe-instruistoj). Bedaŭrinde ilia privata iniciato, kiu ekestis ekstere de la oficiala organiza strukturo, ne trovis subtenon kaj komprenon de tiamaĵ movadanoj ene de Internacia Centra Komitato, la gvida supera instanco de Esperantio, antaŭulo de UEA.

1. Kiel funkcias la administrado de IEI? Kiu estas via persona agado en ĝi?

La instituto estas laŭleĝa fondaĵo kies celo estas disvastigado kaj instruado de Esperanto por la ĝenerala utilo de la tuta socio. IEI havas sidejon en Hago en sia propra domo, nomata Cseh-domo, kie troviĝas la biblioteko kaj salono por renkontiĝoj.

IEI ne havas membrojn, sed estraron kiu okupiĝas pri la administrado. Ene de la estraro mi estas sekretario. Bedaŭrinde la instituto ne havas ĉi-momente la prezidanton kaj la kasiston. La estraro daŭre serĉas novajn estraranojn, tamen tio ne estas facila tasko. La estraranoj de IEI laboras volontule, do ne ricevas salajron aŭ iun kompensaĵon por dediĉita tempo. La estraranoj dediĉas sian tempon kaj fortojn entute neprofiteme.

Esperable troviĝos homoj kiuj aliĝos al la estraro aŭ alimaniere subtenos ĝian agadon por Esperanto. Ni ofte ricevas demandojn kaj petojn de esperantistoj pri helpo kaj subteno. Mia alvoko al ĉiuj esperantistoj estas: ne demandu kion IEI povas fari por vi, demandu kion vi povas fari por IEI, kaj pere de IEI por Esperanto. Nur komuna agado povas alporti fruktojn. Kune, kunigante niajn spertojn kaj sciojn, ni povas atingi pli!

Pasintjare la estraro de IEI skribis leteron al ĉiuj bazaj lernejoj en Hago (ĉirkaŭ 150) invitante al la Cseh-domo kaj proponante prezenton de Esperanto al la lernantoj. Nur unu

lernejo, Internacia Bazlernejo en Hago, reagis pozitive. Kaj mi sukcesis prezenti Esperanton en februaro 2020 al lernantoj, instruistoj kaj kelkaj gepatroj kadre de la Semajno de Lingvoj. La ideo estis informi infanojn pri diversaj lingvoj kaj transdoni al ili la mesaĝon ke ĉiu lingvo gravas, ĉar ĉiu lingvo estas gepatra lingvo de iu persono, kaj ĉiu persono gravas. Ĉiujare IEI organizas Zamenhoftagon kaj de tempo al tempo literaturajn renkontiĝojn. En 2016 ni organizis du renkontiĝojn kun lernantoj de Esperanto pere de Duolingo. Bedaŭrinde la aranĝojn vizitas malmulte da homoj. Mi pensas, ke ni unue kune devas labori pri la disvastigado de Esperanto, por ke sekve ni povu atendi demandojn pri la kursoj, kiel tio okazis dum la tempo de Andreo Cseh.

2. Kiel statas nuntempe la eldona agado de IEI?

IEI ne havas propran eldonejon, sed transdonas la presadon al la ekstera eldonejo. En sia tuta 90-jara historio IEI eldonis ĉirkaŭ 50 Esperanto-librojn. La vendado de libroj tamen stagnis, ŝajnas ke esperantistoj ne multe interesiĝas pri la legado de Esperanto-libroj. IEI havas ankoraŭ grandan stokon de eldonitaj libroj kaj ankaŭ multe da novaj libroj kaj brokantaĵoj, kiuj tamen ne bone vendiĝas.

3. Kion vi opinias pri la didaktika filozofio de Andreo Cseh en la moderna, interreta mondo?

Persone mi estas granda favoranto kaj defendanto de Ĉe-metodo. Antaŭ kelkaj jaroj daŭris disputoj ene de la estraro de IEI pri la fakto de la heredaĵo de Andreo Cseh, kelkaj diris ke Ĉe-metodo estas arkaika kaj devas malaperi. Feliĉe finfine la estraro akceptis la argumentojn de la probatalantoj kaj decidis savi la historian metodon de la pereco. Laŭ mi Ĉe-metodo estas bonega entuziasmigilo por Esperanto. Ĝi ebligas sufiĉe klare, facile kaj konvinke prezenti Esperanton kaj montri la bazajn sciojn pri Esperanto. La reston devas ĉiam fari la lernantoj mem. Sen tre profunda studado de la gramatiko oni ne povas bone lerni eĉ Esperanton. La plua lernado de Esperanto estas precipe nun en la epoko de interreto bone alirebla, nur mankas bonaj senpagaj lerniloj. IEI lanĉis apon por la lernado de Esperanto, bedaŭrinde la programisto forpasis kaj la afero ne progresas nun pro manko de profesiulo, kiu povus daŭrigi la laboron.

Unu el la plej grandaj eraroj de Esperanto-entuziasmuloj estas, miaopinie, ke oni parolas pri tre facila lernado de Esperanto. Tio estas misgvida informo, kiu pli malhelpas al Esperanto, ol helpas.

4. Via virtuala evento en 2020 estis tre riĉenhava kaj korvarma. Ĉu vi intencas plu starigi tiajn eventojn?

IEI decidis organizi la retan-eventon pro la 90-jariĝo por ne prisilenti tiun gravan datrevenon kaj resti en kontakto kun Ĉe-instruistoj,

esperantistoj kaj la komunumo, kiu subtenas Esperanton rete vizitante la Facebook-paĝon de IEI. Menciinda estas, ke la plej granda grupo de Facebook subtenantoj venas el Brazilo. Mi volas kapti la okazon elkore danki al la Brazilaj samideanoj pro tiu valora kaj esperiga agado kaj apogo.

La preparoj por la reta festo daŭris dum multaj monatoj kaj kostis multege da tempo kaj energio. Ĉiuj estis bonvenaj, ĉar ja okazo de la renkontiĝo estis vere speciala, tamen aliĝis al ĝi nur ĉirkaŭ 80 homoj, partoprenis ĉirkaŭ 40. Por mi ĝenerale gravas ne kvanto, sed la kvalito. Kaj la kvalito de la ĉeestantoj estis superba. Tamen la demando estas ĉu vere esperantistoj sentas la bezonon de similaj eventoj.

Mi opinias, ke ni unue devas pligrandigi la rondon de Esperanto-parolantoj, entuziasmigi por Esperanto homojn el la “ekstera mondo” kaj strebi al kunlaborado. Laŭ mi nia devo estas zorgi, ke ĉiu homo sur nia planedo eksciu pri Esperanto. Mi ne propagandas, mi ne devigas iun ajn paroli Esperanton aŭ fariĝi, esti aŭ resti Esperantisto, mi simple volas, ke homoj eksciu, ke Esperanto ekzistas kaj taŭgas. Ke ni ricevis tiun miraklan lingvon donace, por uzi ĝin tutmonde. Kompreneble mi esperas, ke homoj kiuj ekscios, ke Esperanto ekzistas ankaŭ eklernos ĝin bone kaj ekuzos. Sed tio jam estas sekvontaj paŝoj. La unua paŝo estas, miaopinie, informi kaj montri ke la lingvo funkcias. Tiucele mi agas por Esperanto! ■

Iom da filozofio

kun José Mauro Progiante

Ni lernu de la birdoj kaj la lilioj

Ĉio estas simpla por Dio, ĉio estas dia por la simpluloj."

(André Comte-Sponville)

Rara virto estas la simpleco kaj pruvas tion la amaso da malfeliĉuloj en la mondo, konstante serĉantaj aferojn ne bezonatajn.

Kiam Jesuo rekomendis rigardi la birdojn de la ĉielo kaj la liliojn de la kampo, kiuj nature estas nutrataj kaj kreskas, li intencis ne nur plifortigi en siaj sekvantoj la fidon je Dio, sed ankaŭ atentigi ilin pri la valoro de la simpleco.

Ĉiu virto estas grava, sed manka, se ĝia posedanto ankoraŭ ne atingis la simplecon, kiu donas esencon al la aliaj virtoj. Ekzemple, sen ĝi la dankemo povas esti afekta kaj la kuraĝo povas ŝajni paveca. Kiam la virtulo estas ankaŭ simpla, li agas egale pu-

blike kaj private, sen kaŝitaj intencoj. Li ne zorgas pri sia reputacio, pri kiel oni bildigas lin.

Dum la semado, la simplulo ne antaŭvidas la rikolton, ĉar plej gravas por li la estanteco. Li vivas, spiras, sen grandaj klopodoj nek gloroj, sen orgojlo nek timo, kvazaŭ la eterneco estas la nuno. Nenion li volas ŝajnigi, tial nenion li volas pruvi. Nenion li serĉas, ĉar ĉio bezonata jam ĉeestas.

Tamen oni ne konfuzu simplecon kun stulteco aŭ suprajeco. Ĝia signifo, tute alie, estas kontraŭo de komplekseco kaj pretendemo. Dum kuraĝa pretendulo estas malŝatinda, simplulo estas alloga kaj simpatia, eĉ se malkuraĝa.

Havi simplecon estas ne kompliki la aferojn kaj la vivon, “akcepti tion, kio venas, kaj nenion konservi kiel sian”, kiel diris la franca verkisto Christian Bobin.

Bedaŭrinde ni emas mal-simpligi ĉion kaj taksas pli valoraj la aferojn pli kompleksajn, kiel pompaj paroladoj, multifunkciaj objektoj, lacigaj vojaĝoj ktp, eĉ se tio alportas al ni pli da zorgo ol da plezuro.

Krom la averto de Jesuo pri la simpleco de la birdoj kaj

la lilioj, por plifaciligi nian vivon ni atentu la sintenon de la sciencistoj. Inter du teorioj aŭ du formuloj, ili ĉiam elektas la plej simplan, kiu pli bone esprimas la esencon de la kosmaj leĝoj. Ni memoru, ke por montri la rilaton inter energio kaj maso, Ejnŝtejno skribis simple: $E=mc^2$. ■



Pli granda tago

ALENCAR ESMERALDO

Post kiam mi faris ĉiujn ekzercojn, kiuj daŭris du monatojn, alvenis la tago, kiam mi devis iri al Insulo Anchieta (elp. anŝieta). Al tiu konata insulo oni alportas krimulojn, ĉar en ĝi staras Ŝtata Prizono Insulo Anchieta. Tiu insulo situas norde de la ŝtato San-Paŭlo, proksime al la urbo Ubatuba, nome al la kvartalo Saco da Ribeira. Ni renkontiĝis en la kazerno por ŝarĝi kamionojn por la transportado de materialo kaj nutraĵoj uzotaj dum la restado en la insulo. Poste ni ripozis, antaŭ la vojaĝo.

En la antaŭtago mi estis anksia, kaj preskaŭ ne sukcesis dormi. Fine la horloĝo montris la trian horon, mi ellitiĝis, baniĝis, brosis la dentojn, raris min kaj direktiĝis al la kazerno. La irado de la kazerno ĝis Saco da Ribeira daŭris proksimume kvin horojn, ni trairis la stacidomon de la Universitato de San-Paŭlo, kiu havas sektion pri studado de marestuloj, en tiu loko.

Malŝarĝinte la kamionon, ni iom mokis la instruiston, kiu tamen ne reagis. Li silente atendis, ke ni finu la laboron. Ni eniris la boaton por iri al la insulo, kvarmejlan krozadon. Mi estis tre feliĉa.

La instruisto demandis nin:



— Ĉu vi estas feliĉaj? Ni vidu do, ĉu vi plu estos feliĉaj, post la tasko, kiun mi donos al vi.

Mi eksentis maltrankviligan antaŭsenton. Li sekve diris:

— Vi, lernantoj, rajtas havi nur bankalsonon, naĝmaskon, naĝilojn kaj spirilon.

Ni devis plenumi la ordonon. Post tri minutoj, la tempo elĉerpiĝis, kaj malfruintoj devis ricevi la punon fari gimnastikon ripetatan kvindekfoje. Poste, alvenis nova ordono. Ni devis enakviĝi kaj naĝi al la insulo. Post iom da tempo, pro elĉerpiĝo, homoj naŭziĝis kaj vomis. Tre lacaj, ni atingis la kajon. Ĉu ni rajtis ripozi? Tute ne. Ni devis transporti la ŝarĝon al la deponejo.

Post tiom da laboro, ni apenaŭ sukcesis piediri, nia kapo turniĝis, la kruroj jam ne obeis la ordonojn de la kapo. Ni ricevis manĝon nur malfrue, en la posttagmezo. Ĉu ni rajtis pri iom da ripozo? Nur dum unu horo. Tuj poste ni ricevis la taskon aranĝi la gimnastikejon, kie ni ekzerciĝos dum nia restado en la insulo. ■

Esenca verkado

PAULO P. NASCENTES

Versajne komuniĝi estas kunnaskita kapablo. Tiu kapablo ekzistas en bebo antaŭ ol ĝi parolas aŭ skribas. Familie kaj komunume, okazas la lernado de la ĉirkaŭa patrina lingvo. Nur poste, ĝenerale lerneje, venas la eniro en la skriban mondon. Multaj tamen mislernas verki eble pro nacilingva misinstruado. El tio naskiĝas tia kredo: “ho! mi ne scipovas la portugalan!” Multfoje misas la pedagogio de tekstoj, kio estas aparta kapablo de lingvoakirado. Pri la kaŭzoj de tiu fenomeno, ni ne okupiĝu, sed nur pri ĝia konstato kaj ebla solvo. Esence kio mankas aŭ perdiĝis?



Ĉu iel mankas persona kontakto kun onia esenco mem? Jen hipotezo, eĉ se tiu esenco estas nemezurebla, do supeze neekzistanta. Pri tiu

pensomodelo ankaŭ ni ne diskutos. Sed, interesas nin, ĉu estas rimedo kapabla ŝanĝi la malkomfortan situacion. Certe estas onia rajto kapabliĝi kaj verki soci-utilajn tekstojn minimume esprimovajn. Ĉu niaj plej kaŝitaj mensaj tavoloj ne meritas sunlume aperi? Alivorte, ĉu onia psiĥa tuteco ne meritas libere esprimiĝi?

Forte impresis min artikolo aperinta en majo 1986 en la revuo “O Rosacruz” (La Rozakruco), bulteno de la brazila sekcio de AMORC, nome “O Ritmo Pessoal” (La persona ritmo) de Louise Anderson. Temis pri psikologia kolektiva eksperimento okazinta en usona universitato. Laŭ ĝi, grupo de selektitaj homoj skribis pensojn, impresojn kaj konvinkojn dum **almenaŭ 10 minutoj, senhalte, ĉiutage**. Nenia paŭzo devus veni ĉu por elekti la ĝustan vorton, ĉu por ĝustigi gramatikajn aŭ ortografiajn erarojn, aŭ eĉ por alveni al logika sinsekvo de ideoj. Estas nur du rekomendoj: unue, daŭre ripetu la lastan vorton ĝis alia ekaperu viamense kaj due, estu sincera. La decido sperti tion dum ĉirkaŭ tri semajnoj ŝajnis neevitebla antaŭ mia

ekscitita scivolo. Mian propran sperton mi ne diru. Tio estas persona afero. Tamen, iom poste, partnere kun karioka (el Rio-de-Janeiro) psikologino, ni ellernis prie kaj ekgvidis klasojn pri tekstofarado en lernejoj kaj kongresoj laŭ metodo de ni aranĝita surbaze de la artikolo. Kelkaj rezultoj rilate la tekstokvaliton impresis nin kaj diversajn partoprenantojn. Jarojn poste, etendiĝan porinstruistan kurson mi gvidis en Beletra Instituto de UnB. El ĝi venis lumen la nuna versio kune kun plia esploro. Tiel, ekde la 9a de novembro ĝis la 14a de decembro ĉijare, partnere kun alia amikino, okazas perrete nia kurso, nome “Esenca Verkado”. El kio ĝi konsistas?

Facile konstateblas, ke ofte multaj tekstoj ŝajnas esti verkitaj kvazaŭ nur cerbe. Instige de hastaj, malprofundaj, senbazaj pedagogiaj konkludoj, ŝablonoj supozeble efikaj estas proponataj al lernantaro, cele al aprobiĝo en konkursoj kaj ekzamenoj. Claver (2006) pritraktas du problemojn: la uzon de “reguloj de bona verkado cele al aprobiĝo” kaj tio, ke “metodoj kaj teknikoj de verko-instruado ne sukcesas superi la akademiismon kaj la rutinon”.

Imagu, kion faras muzikisto antaŭ ol koncerti? Same volejbalisto aŭ futbalisto, kion ili faras antaŭ la

matĉo? Kion celas la unuaj akordoj, neaŭdeblaj duonvoĉoj, liberaj pilkoŝotoj? Certe la celo estas agordiĝi al la uzota instrumento, ĉu voĉo, ĉu gitaro, ĉu la korpo mem. Tial kadre de nia metodo, unue estas varmiĝo per spirado, korpaj movoj, liniĝo al nia centro. Due, la tasko verki ion ajn dum 10 minutoj (teksto kiel proceso). Trie, legado kaj aŭskultado de poeziaĵo, kanzonoj de la tielnomata brazila popolmuziko (teksto kiel emociigilo). Kvare, venas propradire la tekstoproduktado mem (teksto kiel produkto). Laste, sed ne balaste, legad-rondo cele al la akcepta teksto kaj ĝia kunlabora plibonigo. Ĉiuj do bonetose kunlernas.

Du tiamajn kuriozajn anekdotojn mi rakontu por montri la animstaton de malsamaj kursintoj: timema lernanto de publika lernejo, 13-jaraĝa, kaj viro ĉe la pordo, kiu geste volis komunikiĝi kun amikino ene de la klasĉambro. Post la komando skribi vortojn dum 10 minutoj, la knabo timeme, malfortvoĉe, levis la manon kaj demandis min, ĉu li rajtas skribi... fivortojn. Ridete, mi jesis: “Trankviliĝu. Certe vi skribos nenium, kiujn jam mi ne konas. Krome, poste vi povos disŝiri la paperon.” Libera kaj danka, li komencis la skribadon. La viron mi invitis eniri en la ĉambron kaj partopreni la sesion. Dankeme, li sindirektis al libera

sidloko, prenis skribilon, paperon, trankvilon. Kurioze, kiam komenciĝis la legad-rondo li levis la manon. Siavice, li emocie eklegis sian verkon. Post la laŭdo de kolegoj, li sin konfesis surprizita, ĉar unuafoje venis al li poemo! Inĝeniero, tre racia, sed eble pro la enhavo veninta dum la 10-minuta teksto, li asertis aliri memoraĵojn kaj neatendite sukcesis verki tiel. Spontaneaj aplaŭdoj aŭdiĝis.

Aliokaze, en klaso de instruistoj pri la portugala, unu el ili asertis, ke li preskaŭ ne kredis pri la beleco de teksto de ne tiom brila lernanto. Li legis lian leteron omaĝe al la patro, kiu, enhospitaliĝinta, ne povis pasigi hejme la kristnaskan feston. En tiu tago, kaŝe, kelkaj kolegoj tute vane penis ne ploreti.

Krom oferti plifojne tiun instigan kurson, venis al mia kapo la ideo esperantigi ĝin por instruado kadre de E-klasoj. Se partnero sin proponos, tio certe eblos. Dubo tamen estas, ĉu tiu 10-minuta libera skribado ja funkcios aŭ ne fremdlingve. Supozeble por ne denaskuloj de Esperanto ĝi fiaskos, ĉar certe alia cerbo-areo stimuliĝas. Ĉu tio funkcios? Kion vi opinias pri tiu defio?

Certe klarigo povos veni el zorga esploro pri tiaj reagoj. Eble helpos nin informiĝi pri la konoj pri la “kolektiva nekonceito” (Jung, 2017), pri vojoj de homa kreemo (Goswami, 2008) kaj de aliaj sciencistoj. Ambaŭkaze, la suka verkaro naskiĝis el multaj jaroj de studoj kaj eksperimentoj. Minimume, jen bona irvojo por pliaj demandoj kaj esploroj. Ĉu vi tiucele vin prezentas, kara leganto?



Referencoj

CLAVER, R. *Escrever sem doer: oficina de redaçaõ*. 2 ed. revista e ampliada. Belo Horizonte: Editora UFMG, 2006.

GOSWAMI, A. *Criatividade quântica: como despertar o nosso potencial criativo*. Trad. Cássia Nasser, Marcelo Borges. São Paulo: Aleph, 2008.

JUNG, C. G. *O eu e o inconsciente*. Trad. Dora Ferreira da Silva. 27 ed. Petrópolis: Vozes, 2017. ■

Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando

La refleksivo en Esperanto estas unu el la plej malfacilaj gramatikaj punktoj por multaj Esperantistoj.

Oni instruas ĝenerale, ke la ĉefa regulo estas: “la refleksivo rilatas al la subjekto de la frazo”. Tamen, en la Zamenhofa traduko de la Biblio oni trovas la jenan frazon:

Virinon malĉastan aŭ senhonorigitan ili ne prennu, kaj virinon, forpuŝitan de sia edzo, ili ne prennu; [...] (LEV 21:7)

Ĉu Zamenhof faris escepton?

Respondo

La problemo kuŝas ne en Zamenhof, sed en tio, ke la uzadon de la refleksivo oni instruas ordinaro supraĵe, eĉ en perfektigaj kursoj.

Fakte la refleksivo estas malsimpla punkto de la Esperanta gramatiko; plena klarigo pri ĝiaj diversaj facetoj okupus plurajn paĝojn de La Lampiro. Rezulte, mi limigos la diskuton al la citita ekzemplo.

Pri la refleksivo la Akademio de Esperanto decidis en 1971 la jenon: *la refleksivaj pronomoj (serio “si/sia”) rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.* (AA)

La ekzemplo citita en la demando rilatas al la punkto (2). Alivorte, la participo *forpuŝitan* enkondukas novan subjekton (*virinon*). La refleksiva formo sian rilatas al tiu nova subjekto, kaj do estas en ordo. Jen pliaj ekzemploj pri la punkto (2), rilataj al aktiva participo:

[...] li ekvidis la anĝelon de la Eternulo, starantan sur la vojo kun glavo en sia mano; (NOM 22:31) — la participo

starantan enkondukas novan subjekton, nome, *la anĝelon de la Eternulo*; la glavon tenas la anĝelo mem, do la refleksivo estas ĝusta.

[...] li estos kiel arbo, [...] donanta sian frukton en sia tempo; (PSA 1:3) — simile.

[...] Liaj amantoj estu kiel la leviganta suno en sia potenco; (JUG 5:31) — simile.

[...] lia fratino el kompatato [...] malkovris al li la koron de la memvole sin forpelinta filino. (BV) — simile.

[...] ŝi ekaŭdis la sonon de korno, penetrantan al ŝi tra la akvo, [...] (FA1) — la participo enkondukas novan subjekton (korno), sed ĝian sonon ekaŭdis la antaŭa subjekto (ŝi), tial Zamenhof ne uzis la refleksivon. Ŝi [...] deŝiradis rozojn de klinigantaj al ŝi arbetojaj branĉoj [...] (MA) — simile.

Ili devas ne provi sklavigi kaj regi la partojn ne apartenantajn al ili [...] (RES) — simile.

[...] ŝi la faratajn al ŝi demandojn devis respondadi [...] (MA) — reordigo de la frazo evidentigas, ke temas pri la

punkto (2), simile al la antaŭa ekzemplo: *ŝi devis respondi la demandojn faratajn al ŝi.*

Nun ni vidas Doroteon, sin direktantan al sia kaduka dometo, [...] (FP) — la dua subjekto estas Doroteo, kaj la verbo *direkti* rilatas al ŝi mem, do refleksivo *sin* estas en ordo; plie, la posedpronomo ankaŭ rilatas al Doroteo, tial la refleksivo estas uzita duafoje.

Tie li pasigis horojn, [...] sentante sian malnovan malamon suprenirantan al lia cerbo [...] (KP) — e-finaĵa participo (*sentante*) neniam povas enkonduki novan subjekton, tial la refleksivo *sian* estas ĝusta; tamen la a-finaĵa participo (*suprenirantan*) ja enkondukas novan subjekton (*malamon*), kaj ĉi-okaze la refleksivo estus malĝusta.

[...] li havas emon fari senspritan ŝercon pri sia homfrato, peteganta pri sia vivo. (VK) — la unua subjekto estas li, kaj temas pri homfrato de li mem, do la unua refleksivo estas ĝusta; la participo enkondukas duan subjekton (*homfrato*), al kies vivo la petego rilatas, do ankaŭ la dua refleksivo (*sia*) estas ĝusta.

Nun ni ekzameni pliajn ekzemplojn pri pasiva participo:

Clemency skuis la donitan al ŝi manon [...] (BV) — la pasiva participo enkondukas novan subjekton (*manon*), tial Zamenhof ne uzis la refleksivon.

Ĉu la patro havas la rajton pereigi por ĉiam la tenotajn, konfiditan al li? (RAB) — simile.

Ŝi [...] renkontis per sia rigardo la sur ŝi fiksitajn [...] okulojn de Marta. (MA) — simile.

[...] la plej altaj ĥinaj provincestroj nenion scias pri la loĝantoj [...] de la regionoj **konfiditaj al ili.** (FK) — simile.

[...] la profeto sidigis sur la montrita al li loko [...] (FAR) — simile.

[...] li ricevis paketon, adresitan al lia nomo: [...] (PF) — simile.

[...] la maljuna apostolo paŝtas la konfiditajn al li ŝafojn [...] (QV). — simile.

[...] ŝi ne [...] ne evitu la destinitan al ŝi amfiteatron. (QV) — simile.

[...] ŝi volonte ekkaptis la altiritan al ŝi tranĉilon, por tratranĉi la gorĝon de sia edzo. (KIU) — la unua subjekto estas ŝi, sed la dua subjekto, enkondukita de la participo, estas tranĉilo, do la refleksivo ne aplikigas ĉi tie; tamen edzo ja rilatas al ŝi, do ĉi tie la refleksivo estas ĝusta.

[...] la kongreso voĉdonas pri demandoj submetitaj al ĝi. (Esperanto en Perspektivo) — simile.

Tiel parolis enirante malgrasa viro, [...] kun [...] vestoj malbone adaptitaj al lia figuro. (Ĉu ni kunvenis vane?) — simile. *Supozeble li trovis alian kopiiston pli malfermitan al liaj ideoj.* (ŜU) — simile.

[...] ekvidinte la fraton ĉe sia lito, zorgeme klinitan al li, li diris: [...] (PF) — refoje notu, ke la e-finaĵa participo ne enkondukas novan subjekton, sed rilatas al la unua subjekto (*li*), sekve la refleksivo *sia* estas en ordo; tamen la dua subjekto estas la frato, kies kliniteco rilatas ne al si, sed al la unua subjekto, tial Kabe ne uzis ĉi tie la refleksivon.

[...] konfesante la instruon, enradikigitan al ŝi de la kvazaŭ-patrina, ŝi promesis defendi sin [...] (QV) — simile.

Ŝi sentis sin ekokupata de vera teruro, vidante fiksita al ŝi tiun senvivan rigardon, [...] (KP) — simile [...] Sokrato daŭrigu sian kutimon ne mem respondi, sed nur refuti argumenton prezentitan al li. (RES) — simile.

Esperable la ĵus donitaj ekzemploj klarigas la aferon. Tamen, por kompliki la situacion, ne ĉiam aŭtoroj obeas la antaŭe prezentitajn principojn. Kaj fakte la Akademio ankaŭ decidis, ke: *nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata*. Jen kompreneble subjektiva kriterio. Ĉi-sekve vi trovos kelkajn ekzemplojn pri nekonformiĝo al la punkto (2):

[...] unu viro havis nombron da anglaj pensoj fiksitaj al sia pantalono [...] (KK)

[...] Chilo [...] ekvidis konatajn al si homojn. (QV)

[...] li vizitadis bestojn kaj amfiteatron, por almenaŭ rigardi la konatajn al si kaj nekonatajn bestojn. (QV) — simile.

[...] la [...] knabo devis stari kun ĉevalvosto, ligita al sia dorso kaj kun kolombo, ligita al sia fingro. (SR) — simile.

Stefano tenis la kapon klinita al sia kajereto, [...] (ĈRN)

[...] ili balanciĝis malrapide sur la piedoj kun [...] la manplatoj levitaj al sia dio. (ŜU)

Referencoj

AA <https://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj2/rekome ndoj.html>

BV *La Batalo de l' Vivo*. Trad. L. L. Zamenhof. 1896.

ĈRN *Ĉu rakonti novele?* Claude Piron. 1986.

FA1 *Fabeloj de Andersen 1*. Trad. L. L. Zamenhof. 1909.

FAR *La Faraono*. Trad. Kazimierz Bein (Kabe). 1907.

FK *Fundamenta Krestomatio*. Diversaj personoj. 1904.

FP *La Forgesita Pipo*. Trad. I. Kaminski. En: *Fundamenta Krestomatio*. 1904.

JUG *Juĝistoj* (Malnova Testamento). Trad. L. L. Zamenhof. 1916.

KIU *Kiu Estas la Plej Bona Amiko de la Viro?* Trad. K. Hübert. En: *Fundamenta Krestomatio*. 1904.

KK *Kompatinda Klem*. John Merchant. 1931.

KP *La Kastelo de Prelongo*. Henri Valienne. 1907.

LEV *Levidoj* (Malnova Testamento). Trad. L. L. Zamenhof. 1916.

MA *Marta*. Trad. L. L. Zamenhof. 1910.

NOM *Nombroj* (Malnova Testamento). Trad. L. L. Zamenhof. 1916.

PF *Patroj kaj Filoj*. Trad. Kazimierz Bein (Kabe). 1909.

PSA *Psalmaro* (Malnova Testamento). Trad. L. L. Zamenhof. 1916.

QV *Quo Vadis?* Trad. Lidja Zamenhof. 1933.

RAB *La Rabistoj*. Trad. L.L. Zamenhof. 1908.

RES *La Respubliko* Trad. Donald Broadribb. 1993.

SR *Satiraj Rakontoj*. Sándor Szathmári. 1950–1969.

ŜU *La Ŝtona Urbo*. Anna Löwenstein. 1999.

VK *Vojaĝo al Kazobinio*. Sándor Szathmári. 1938. ■

ANNA LOBO

KISU LA GRUNDON

Originala nomo: Kiss the Ground

Direktoroj: Joshua Tickell kaj Rebeca Harrell Tickell

Verkistoj: Johnny O'Hara, Joshua Tickell kaj Rebeca Harrell Tickell

Fakulo: Woody Harrelson

Tipo de Filmo: Dokumentario

Lando: Usono


Lanĉo: Aprilo 2020

Tempodaŭro: 1h 24min

Hodiaŭ mi estas tre feliĉa, ĉar mi prezentos al vi ion malsaman ĉi-foje. Temas pri dokumentario, kiu estas spektebla en Netflix. Tiu tipo de nefikcia filmo kutime estas prilaborata kun celo esplori realecon kaj subjektivan vidpunkton pri ĝi. Oni vidas ke estas multaj klopodoj por ke ĝi estu alloga, kaj ĉefe pensigu la spektantaron.

Nuntempe, unu el la temoj ofte diskutata estas pri tio, ke la homaro devas pli bone atenti la naturan medion, eligadon de dioksida karbonaĵo, tutmondan varmiĝon kaj rilatajn temojn. Kaj tiu grava subjekto estas ĝuste la temo de tiu kortuŝa dokumentario.

Ĝi reliefigas gravecon ke ni, kiel homaro, vivanta en tiu ĉi granda, bunta, bela kaj abunda mondo, reviziu tion, kiel ni tuŝas kaj flegas,



tie kie ni paŝas kaj tion, kio nin subtenas: la grundon. Estas bele vidi kiel ĝi montras la evoluadon de tiu diskuto tutmonde, kion oni realigis pri tiu temo - ekde homoj kiu proksime manumas tiun riĉan mondan grundon, ĝis tutmondaj politikaj agoj.

Estas admirinde vidi tie kolekton da spertoj pri kiel teni nian teran grundon sana, observi la kapablon de naturo regeneriĝi tiom facile post simplaj agoj, kaj helpi ĝin kapti la karbonan gason kiu pruvite varmigas nian planedon. Ĝi estas klara kiel akvo - ni dezertigas nian grundon, kaj urĝas ke ni vivigu kaj reverdigu ĝin! Ili stimulas nin je niaj haŭtoj percepti la gravecon agi. Kaj agi NUN. Bonan spektadon kaj ĝis poste! ■

Recenzo:

"Ses rolantoj serĉantaj aŭtoron"

PAULO SÉRGIO VIANA

“Aŭtoro: Luigi Pirandello

Eldonis FEI (Itala Esperantista
Federacio)
2012

Esperantigis Carlo Minnaja

En la jaro 2012, kiam okazis Itala Kongreso de Esperanto en Sicilio (Mazzara del Valle), la itala federacio eldonis belan volumon “Luigi Pirandello kaj aliaj siciliaj aŭtoroj). Ĝi estas impona antologio, en kiu unu perlo elstaras: la fama dramo de Pirandello ”Ses rolantoj serĉantaj aŭtoron“. Klasika teksto, do neniam malaktuala.

Ĉiu arto havas la celon reprodukti la vivon, la mondon, laŭ la rigardo de la artisto. Oni diras, ke ”arto imitas la vivon“, kaj ke kelkfoje eĉ ”la vivo imitas arton“. Sed inter la diversaj tipoj de arto, eble tiu, kiu plej esence celas imiti la vivon, estas la teatro. La

samon oni povus diri pri la kinoarto, kiun oni povus konsideri ido de teatro.

Pirandello tion komprenis en tiel profunda grado, ke li donis vivon al teatraj roluloj, en ĉi tiu dramo. Per iom fantasta tono, li metis ses homfigurojn sur la scenejon, kvankam ili ankoraŭ ne trovis lokon en iu ajn difinita teatraĵo. Tamen ili mem travivas sian homan vivodramon, antaŭ ol ili fariĝos veraj dramroluloj. Sufiĉe surealisma situacio!

Resume: la dramo komenciĝas, kiam veraj geaktoroj kaj trupestro klopodas komenci provludon de konata teatraĵo (de Pirandello mem). Subite, alvenas ses strangaj homoj, kiuj sin prezentas kiel roluloj, kiuj ankoraŭ ne trovis lokon en teatraĵo. Ĉi tiuj ŝajnas vagantoj sen propra destino, en la mondo. Estiĝas dialogo vigla, foje amuza kaj samtempe tragika, pri la loko de homoj en la mondo. Realo miksiĝas

kun absurdo, tamen en tute natura maniero. Ĉu ne tia estas nia ĉiutaga vivo?


Montriĝas iom post iom, per la mirinda lerteco de la teksto, ke inter realaj aktoroj kaj figuraj roluloj ekzistas ia senduba simileco. Kaj la leganto (aŭ la spektantoj de la dramo, en teatro) neeviteble perceptas, ke ankaŭ li, reprezentanto de la publiko, de la tuta homaro, konsistas el la sama esenco: ni ĉiuj estas figuroj travivantaj dramon, eĉ se ni ankoraŭ ne trovis aŭtoron, kiu povus transformi nian vivodramon en

artaĵon. Krome: ni mem havas la taskon transformi nian vivodramon en artan travivaĵon, sendepende de aŭtoro ekstera.

La ideo estas kapturna, kaj ne eblas tralegi ĉi tiun teatraĵon sen demando en la kapo: “Kion mi faras el la dramo, kiu estas mia vivo mem?”

La Esperantan tradukon faris akademiano Carlo Minnaja, kio estas garantio de tute bona teksto. En nia literaturo ne povus manki tiu gemo el la universala trezoro. Gratulon al la italaj samideanoj, kiuj ĝin donacis al ni. ■





Fondusoj de EASP

Se eblas al vi,
konsideru la eblecon
subteni la asocion
per mondonaco.

Konatiĝu kun niaj fondusoj:

easp.org.br/asocio/doacoes

